8-a Jaro — No 12 VERSCHIJNT MAANDELIJKS Junio 1937

…L.E. * (Nia Estas La Estonto)
Flandra Esperantista Grupo
Ejo * Breughel *
Em. Jacqmainlaan, 37, Brussel (Belg.)

# FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA ESPERANTO MOVADO

Officieel Orgaan van den

Vlaamschen Esperantisten - Bond



Administranto: A. De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.
Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.
Eksterlando: 6 belgoj.

# Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

**Magdalenastraat, 29, KORTRIJK**

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

| | | |
|---|---|---|
| En okcidento nenio nova — Remarque | Fr. 55,— | bind |
| La Viro el Francujo — Ivans | 29,— | » |
| Gösta Berling — S. Lagerlöf | 55,— | » |
| Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim | 29,— | » |
| La Ora ŝtuparo — Oppenheim | 29,— | » |
| Ŝi — H. Rider Haggard | 29,— | » |
| Petrolo, vol. 1 — U. Sinclair | 29,— | » |
| Petrolo, vol. 2 — U. Sinclair | 29,— | » |
| Luno de Izrael | 29,— | » |
| La Dormanto Vekiĝas | 29,— | » |
| Pallieter — F. Timmermans | 28,— | » |
| La Leono de Flandrujo — H. Conscience | 32,— | » |
| Tra la Labirinto de la Gramatiko | 40,— | » |
| Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans | 7,50 | broŝ. |
| La Du Amatinoj — de Musset | 7,50 | » |
| La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf | 12,— | » |
| Gösta Berling — S. Lagerlöf | 45,— | » |
| La Homaj rasoj de la Mondo | 24,— | » |
| Kudlago, la malgranda eskimo | 5,— | » |
| Barbro kaj Eriko — Letera romaneto | 4,— | » |
| Anni kaj Montmartre — R. Schwartz | 18,— | » |
| Konversacia Literaturo (Cseh-metoda) | 12,— | » |
| Fundamenta Krestomatio — Zamenhof | 20,— | » |
| Nieuw Leerboek (geïllustreerd) | 12,— | » |
| Examenopgaven | 10,— | » |
| Jubileumboek (Fed. Arbeiders Esperantisten) | 10,— | » |
| Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck | 5,— | » |
| La Verbo en Esperanto | 10,50 | » |
| Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden) | 2,50 | » |
| Schidlof Zakwoordenboek | 25,— | bind |
| Groot Woordenboek Van Straaten | 80,— | bind |
| Plena Vortaro de Esperanto | 84,— | bind |
| Flandra Esper. 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj | **15,—** | broŝ. |
| Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1) | 10,— | » |

**INSIGNOJ:** Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 3.— fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.

Flandra kaj Esperanta flagetoj: 5.— fr.


Krajono kun surpreso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

8-a Jaro — No 12 VERSCHIJNT MAANDELIJKS Junio 1937

# Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:
A. Pittoors
Ten Eeckhovelei, 125
Deurne-Noord
Antwerpen

Administranto:
Adolf De Keyzer
P. vanHumbeekstr., 3
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj
Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.
Eksterlando: 6 belgoj
Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.

*N.E.L.E.* (Nia Estas La Estonteco)
Flandra Esperantista Grupo
Ejo * Breughel *
...laan, 87, Brussel (Belg.)

# Vernieuwing der abonnementen en bijdragen

**Met dit nummer eindigt het bondsjaar 1936-37!**

**Het verloopen jaar was uit alle oogpunten verheugend voor onze organisatie. Wij verhopen dat al onze leden ons trouw zullen blijven en verwachten dan ook geen enkel afvallige. Wij verzoeken derhalve onze leden-abonnenten zonder verwijl hun lidmaatschap (25 fr.) te vernieuwen. De leden eener afdeeling betalen bij voorkeur in hun afdeeling, alleenstaande leden betalen door storting op rekening 232150 van Flandra Ligo Esperantista, Brussel.**

**Wie het volgend nummer van « Flandra Esperantisto » wenscht te ontvangen, betaalt nog vóór 1 Juli zijn bijdrage! Aanstonds na 1 Juli laten we de bijdragen door de post innen, we rekenen echter op de bereidwilligheid onzer leden om ons dit werk te besparen. Niet dralen, ieder begrijpe zijn plicht!**

**(Wie slechts wenscht te abonneeren op F. E. betaalt 20 fr.).**

AL NIAJ EKSTERLANDAJ ABONANTOJ

La nuna numero estas la lasta de via abono al « Flandra Esperantisto » !

Bonvolu renovigi vian abonon pagante 25 fr per poŝtĉekkonto 232150 de Flandra Ligo Esperantista, Brussel, aŭ sendante tiun sumon per internacia poŝtmandato (25 fr = 5 Belgoj).

La Kasisto.

# Esperanto in de Praktijk.

*AUSTRALIE*

Een verzoek tot het beleggen eener internationale conferentie, voor het invoeren eener internationale taal, werd door den Senaat van Australië tot den koning van Engeland gericht.

*FINLAND*

Bij dekreet H. 1116/5671 van 4 Dec. 1936 werd Esperanto, door de maatschappij der Finsche staatsspoorwegen, ingevoerd bij de taalkursussen door de maatschappij voor haar bedienden ingericht.

*FRANKRIJK*

Door de handelskamer van Parijs worden de bewijzen van herkomst in het Fransch en Esperanto opgesteld, dit met het oog op de internationale waarde van dergelijke dokumenten.

*DUITSCHLAND*

De firma Gordon, Dresden, A. 1, Postf. 6, liet een prospectus verschijnen in Esperanto met reclame-tekst voor haar uitstekende motoren.

*ITALIE*

Het ministerie voor pers en propaganda, liet, in Esperanto een nuttig gidsboekje verschijnen, welke geroepen is uitstekende diensten te bewijzen aan toeristen die Italië bezoeken. Het werkje behelst op 96 bladzijden alle inlichtingen nopens hôtel-coupons, benzine-coupons, vermindering op het spoor, enz. Gratis verkrijgbaar bij : E.N. I.T., Via Vittorio Veneto 62 Roma.

*NEDERLAND*

Voor de inspekteurs der officieele scholen, hield Esperanto-leeraar J. Glück in het ministerie voor onderwijs, een voordracht over de paedagogische waarde van Esperanto. Een geanimeerd debat volgde op de meesterlijke uiteenzetting van den heer Glück. Eenparig was men de meening toegedaan dat, mits enkele lichte wijzigingen aan de bestaande taalwetten, Esperanto in den lesrooster der tweedegraadscholen kan worden opgenomen.

M. H. Damme, direkteur-generaal der Nederlandsche P. T. T., hield voor radio Hilversum een voordracht over « P. T. T. en Esperanto ». Deze voordracht was een warm pleidooi voor het internationaal gebruik van Esperanto voor de P. T. T.-diensten.

*OOSTENRIJK*

De Esperanto-werfdienst van Oostenrijk gaf twee rijk geïllustreerde gidsjes in het licht, gratis verkrijgbaar, mits een internationaal antwoord-coupon voor de zendkosten, bij : Internacia Esperanto-Muzeo, Neue Burg I, Wien.

*TSJECHO-SLOWAKIJE*

Het te Praag verschijnend vakblad voor geneesheeren « Lekarska Revue » resumeert zijn artikels in het Esperanto. Een gratis proefnummer kan worden aangevraagd aan volgend adres: Palackélo ul. 15 Praha II.

*ZWEDEN*

De Zweedsche letterkundige associatie belegde met de afgevaardigden van de Zweedsche Esperanto-federatie een vergadering waarop de mogelijkheid van het uitgeven van Zweedsche werken in Esperanto werd onderzocht.

# La 8a Flandra Kongreso de Esperanto

Nia 8-a en Loveno estis inda unuo en la vico de la Flandraj E-kongresoj. Eble pro la fakto ke ĝi okazis en universitata urbo, regis dum la festvespero kaj dum la festeno atmosfero de studenta gajemo. Tio tamen ne malhelpis, ke la kongreso staris en la signo de praktika laboro.

Sabate okazis kunvenoj de la membroj de F.E.I. kaj de la estraro de F. L. E. por ekzameni la staton de la E-movado en Flandrujo kaj prepari novan laborplanon por la venonta sezono. Dume, interkonatiĝvespero kunigis la plejmulton de la kongresanoj en la festsalono de « Vlaamsch Huis ».

Dimanĉmatene sin ripetis la kutimaj programpunktoj de niaj kongresoj : diversaj diservoj aŭ vizitoj al vidindaĵoj, komuna fotografado, sekvantara iro al la urbodomo, oficiala akcepto per la urbestraro kaj vizito al la urbodomo.

La ĝenerala jarkunveno de F. L. E. okazis en kinejo « Lovanium » kie unue estis montrataj la filmoj pri la antaŭaj flandraj E-kongresoj. La liga prezidanto, H. Rainson, malfermis la 8-an jarkunvenon, akcentante pri la graveco de la kunsido; li petis la atenton de la ĉeestantoj por la diversaj raportoj kaj konsilas ne pridiskuti ilin en la kunveno : la raportoj aperos en F.E. kaj preferinde estas unue ekzameni ilin en la sekcioj kaj poste, dum la venonta ligkunveno, prezenti eventualajn rimarkojn.

La ĝenerala sekretario, S-ano G. Debrouwere, voĉlegis sekvantan raporton :

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA
JARRAPORTO 1936-1937.

1. — DECIDIGA JARO POR NIA LIGO. Senkonteste la jaro 1936-37 estis por nia Ligo grava kaj decidiga; unue pro la konsiderinda kresko kiun ni povas noti, due pro la okazinta reorganizo de nia asocio kaj de ĝiaj subfakoj. Ni povas aserti, ke la atingitan rezultaton ni ŝuldas parte al la laboro de la ligestraro, de la sekcioj kaj reprezentatoj kaj parte al la plibonigita organizformo kiu ebligis harmonian kaj sekve fruktedonan laboron. La rezultatoj, kiujn montras jena jarraporto, atestas ke la nova ligestraro, kiu planis kaj aplikis la reorganizon, kondukis nian ligon sur bonan vojon. Sendube ĉio ne ankoraŭ ricevis kompletan solvon, sed, kvankam multo restas farenda, ni jam povas konstati la efikon de unueca laboro kaj tiu konstato estu stimulo por daŭrigi tiudirekten.

Dum jaroj nia ligo vivetis pli malpli bone, sen grandaj zorgoj sed ankaŭ sen grandaj esperoj. Ĝojigaj antaŭsignoj montros, ke forpasis la epoko de la « aliĝintaj grupoj » kiuj kuraĝe sed kun eta efiko laboris pro nesufiĉa subteno flanke de la nacia organizaĵo kiu ne plenumis gvidan rolon.

Kun la helpo de la sekcioj kaj de la reprezentantoj, kiuj konscias pri siaj reciprokaj devoj kaj rajtoj, F. L. E. marŝas al bela estonteco.

2. — NIAJ KURSOJ DUM 1936-37. La kursa centro organizis 43 Cseh-kursojn en 38 lokojn kun sume 1.199 gelernantoj, kiujn gvidis la instruistoj Henk Thien, Sip Stuit kaj Niko De Graan el Nederlando, Karlo Solc kaj Franz Heidler el Ĉeko-Slovakujo.

Sekvas la nomoj de la lokoj kun la respektivaj nombroj :

Aalst (12), Aarschot (23), Anzegem (28), Arendonk (58), Blankenberge (27), Brugge (20), Deinze (33), Dendermonde (16), Diksmuide (34), Geel (55+30), Gent (26), Hamme (10), Handzame (21), Herentals (40), Kortemark (11), Kortrijk (53+28), Leuven (22), Mechelen (8), Mol (58+25), Nieuwpoort (12), Oostende (31), Opwijk (9), Oudenaarde (29), Staden (9+20), Sint-Niklaas (14), Tienen (22), Torhout (52), Turnhout 60+23), Vichte (31), Vilvoorde (8), Waregem (24), Wetteren (89), Wervik (15), Wevelgem (17), Wilrijk (7), Woumen (51), Zaventem (8), Zwevegem (28.

En 6 lokoj okazis kursoj organizitaj de la tieaj sekcioj, kun sume 71 gelernantoj. Sekvas la nomoj kun la nombroj : Aalst (10), Antwerpen (15), Brussel (10+8), Diksmuide (3), Roeselare (10), Vichte (16).

Entute partoprenis niajn kursojn: 1.271 gelernantoj.

3. — SEKCIOJ. Realiĝis al F. L. E. kiel sekcioj, 11 E-grupoj, el kiuj poste likvidiĝis la sekcio Brugge; dum la jaro 10 novaj sekcioj fondiĝis. Entute nia ligo nombras do 20 sekciojn :

| Loko : | membro-abonantoj : | simplaj membroj : | sume : |
|---|---|---|---|
| Aalst | 9 | 3 | 12 |
| Aarschot | 2 | 23 | 25 |
| Antwerpen | 18 | 10 | 28 |
| Arendonk | 15 | 0 | 15 |
| Blankenberge | 10 | 18 | 28 |
| Brussel | 11 | 5 | 16 |
| Diksmuide | 23 | 4 | 27 |
| Kortrijk | 17 | 29 | 46 |
| Leuven | 11 | 17 | 28 |
| Lichtervelde | 4 | 3 | 7 |
| Mechelen | 20 | 3 | 23 |
| Oostende | 15 | 17 | 32 |
| Oudenaarde | 4 | 2 | 6 |
| Torhout | 26 | 5 | 31 |
| Tienen | 5 | 12 | 17 |
| Roeselare | 16 | 8 | 24 |
| Vichte | 10 | 2 | 12 |
| Vilvoorde | 1 | 6 | 7 |
| Woumen | 13 | 38 | 51 |
| Zaventem | 3 | 4 | 7 |
| | 233 | 209 | 442 |

La malproporcieco inter la du nombroj, klare montras ke la propagando por nia revuo en la sekcioj estas ĝenerale malkontentiga. Sole rajtus fari escepton la kunloĝantaj familianoj de membro-abonanto, sed por ĉiuj aliaj ekzistas la morala devo nepre aboni la ligan

ESPERANTISTA DONACO
pri kiu dum la tuta jaro memoras via amiko :
Abono al
LITERATURA MONDO.
Specimeno : 2 fr.
Abono por jaro : 65 fr.
LINGVO - LIBRO
informas vin pri ĉiu okazo en nia literaturo. Abonu ĝin kune kun viaj amikoj.
Abonprezo (tri ekz. kune) 8 fr.
Abonojn akceptas kaj specimenojn sendas :
**FlandraEsperanto-Instituto**
Magdalenast.,29,Kortrijk(P.K. 326851)




Libramanto
Ĉe monkvanto,
Ĉe nur groŝoj
En la poŝoj,
Legi ĉiu povas,
Libron ĉe ni trovas.

bultenon. Jen bela tasko por la sekciestraroj : konvinki la 209 s. m. ke ili fariĝu m. a. !

8 sekcioj posedas bibliotekon kun sume 325 libroj.

Nur unu sekcio ricevas oficialan subvencion, Bruselo, krom monan subvencion tiu sekcio ĉiujare rajtas elekti senpage librojn por sia biblioteko.

Konsiderinte ke laŭstatute 5 membroj sufiĉas por starigi organizitan sekcion, ilia nombro estas multe tro malgranda. La duobligo de la nombro da liganoj devas ankaŭ signifi duobligon de la nombro da sekcioj.

La kunlaboro inter la sekcioj kaj la ligestraro estis ĝenerale kontentiga; tamen ni ŝatus vidi pli aktivan agadon ĉe kelke da ili.

4. — REPREZENTANTOJ. 8 malnovaj reprezentantoj subsbribis la formularon pri aliĝo al la Ligo. Por 5 lokoj ne jam reprezentitaj sin anoncis novaj reprezentantoj. 3 forfalis pro starigo de sekcioj kaj 1 eksiĝis. Izolaj reprezentantoj do restas en 9 lokoj. Tiu nombro estas tute sensignifa kaj absolute necesas ke en ĉiu loko kie F. L. E. havas membron, tiu persono akceptu funkcii kiel aktiva propagandisto. La reprezentantoj ankaŭ ne forgesu ke ili skribe akceptis agadi por atingi starigon de sekcio.

5. — MEMBRONOMBRO. En la jaro 1935-36 nia Ligo havis 246 membrojn; por 1936-37 tiu nombro estas 459, do kresko da 213 membroj (85%). Kompare kun la sumo da kursanoj ni konstatas ke ĝis nun nur 15% da ili estas varbitaj por la Ligo. Kelkaj kursoj ne jam finiĝis kaj tiu proporcio verŝajne kreskos ĝis 20%. Sendube ne ĉiuj kursanoj eniras la movadon sed tamen ni malkaŝe diru ke tiu proporcio estas absolute nesufiĉa. La celo por la venonta sezono estu plialtigon de la procentaĵo ĝis minimume 40%; tio estas facile atingebla se ĉiuj faras sian devon.

6. — FLANDRA ESPERANTISTO. Dum la pasinta jaro F. E. havis 360 abonantojn. Nia organo aperis 500 ekzemplere dum la dek unuaj monatoj, 600 ekzemplere dum la lastaj monatoj (majo-junio) pro la fakto ke la multaj novaj abonantoj por 1937-38 senpage ricevis tiujn jarfinajn numerojn. Komence de la jaro, S-ano Debrouwere, liga sekretario, transdonis la administradon de la bulteno al S-ano Adolf De Keyzer, kiu ankaŭ fariĝis liga kasisto post la eksiĝo de S-ano Bassleer. Je la novjaro eksiĝis kiel redaktoro S-ano C. Schroeyers, transprenis la taskon S-ano A. Pittoors. Pluraj kunlaborantoj prizorgas regulajn rubrikojn en F. E. La iniciato de sekcio Antwerpen, kiu proponis monkolekton por la havigo de skribmaŝino al la redakcio, havis bonan rezultaton. Nia redakcio sekve estas pli bone ekipita por sia laboro. Ankaŭ eksiĝis la ekspedisto S-ano Van der Mast; transprenis la taskon S-ano P. Van Peel. La reorganizo alportis kelkajn modifojn en la ekspedo, kun la bona rezulto ke dum la tuta jaro nur unu plendo trafis la administracion !

7. — LIGKUNVENOJ F. L. E. kunvenis trifoje en Brussel. Nur 6 sekcioj sendis reprezentanton al ĉiuj kunsidoj, nome : Aalst, Antwerpen, Brussel, Kortrijk, Leuven, Mechelen. Al 2 kunsidoj venis la sekcio Oostende. Al 1 kunsido venis la sekcioj : Oudenaarde, Roeselare, Tienen, Vilvoorde. Ne venis : Lichtervelde.

La aliaj sekcioj nur ĵus fondiĝis kaj ne jam havis okazon por veni. Nepre necesas ke daŭre regu kontakto inter ligestraro kaj sekcioj; ne sufiĉas korespondа rilatado; por glate funkciigi la asocion, necesas persona kontakto. Konsiderante la gravan utilon de tiuj kunvenoj kaj por stimuli la partoprenon, la Ligo repagas se necese la duonon de la vojaĝkostoj al la delegitoj (unu po sekcio), la alian duonon pagu la sekcio. Same dezirinde estas, ke la izolaj reprezentantoj laŭeble ankaŭ ĉeestu la ligkunvenojn.

8. — FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO. Kvankam ĝi estas aŭtonoma entrepreno kun propraj statutoj kaj estraro, F. E. I. devas certgrade esti konsiderata kiel subfako de la Ligo kaj tiel utilas resume pritrakti ĝin en la kadro de la liga raporto. La konsideroj kiuj valoris por la Ligo, same estas aplikeblaj por la Instituto : dum jaroj ĝi vivetis pli malpli bone. Dum 1936 vendiĝis por 6.088,82 frankoj da varoj; post depreno de la administraj kostoj kaj amortizoj restis 171,48 frankoj da neta profito (2 1/2 %). Kiam en la jaro 1931, dum kunveno de F. L. E. estis decidite starigi la Instituton, la celo ne sole estis plifaciligi la akiron kaj eldonon de libroj, sed ankaŭ havigi el ĝi la bezonatajn monrimedojn por la Ligo. Ĉiuj certe konsentos ke per tiu 2 1/2 % oni ne savos la situacion, sed, ni esperas ke tiu konstato vekos en vi la konscion ke la Instituto povos plenumi sian rolon nur kiam ĉiuj decidos aĉeti librojn nur pere de nia libro-servo. La progreso aŭ malprogreso de nia libro-servo ĉefe dependas de la vigleco de la liga agado. La plibonigita stato de la Ligo ne jam povis influi la nunan bilancon de la Instituto, kiu estas farita laŭ la kalendara jaro, dum ke la Ligo kalkulas de julio ĝis junio de la sekventa jaro. Tamen ni povas diri, ke por la 4 unuaj monatoj de 1937, *la vendoj jam superas tiujn de la tuta jaro 1936*. Ĝis nun la Instituto agis ĉefe kiel peranto inter la eldonejoj kaj la flandraj esperantistoj. La kreskanta intereso por nia movado en Flandrujo vekigis novajn postulojn kaj venis la momento por pli grandskala agado. Kiel vi scias, antaŭ unu jaro ni kontraktis por vendado de la

ilustrita gramatiko kiun eldonis « Literatura Mondo »; nun, post unu jaro, nur kelkaj ekzempleroj estis liveritaj; urĝe necesas liberigi nin de la eksterlando kaj kiel unua tasko estas planita la eldono de propaganda broŝuro, de lernolibro kaj de vortareto. Por tio tamen ne sufiĉos la nuna kapitalo kaj necesos fari alvokon por subskribo de akcioj. F. E. I. estas leĝe fondita kiel asocio sen profita celo; por fariĝi membro oni ne pagas kotizon sed devas subskribi minimume unu akcion je 100 frankoj, por kiuj la membro ne ricevas rentumon. Okaze de eksiĝo, la akcioj estas repagataj.

9. — MIGRANTA EKSPOZICIO. La reorganizo de tiu liga subfako estis pritraktita dum du kunvenoj. La amplekso de la kolekto ĝis nun ne estas tre granda, estante ankoraŭ en formado. La kernon formas la persona kolekto kiun cedis S-ano Rainson, esperante ke aliuloj sekvus lian ekzemplon. Libroj, broŝuroj, afiŝoj, glumarkoj, insignoj, ĉio estas bonvena kaj povas esti sendata al la prizorganto : S-ano G. De Boes, Wijnstraat, 81, Ronse. La kolekto servis nur du fojoj, nome por ekspozicioj en Roeselare kaj Diksmuide; malgraŭ ke la materialo ne jam sufiĉas por plenigi grandan standon, ni rekomendas tamen ĝin uzi, ĉar treege utila estas la propaganda efiko de E-ekspozicio. Sekcioj kaj reprezentantoj de F. L. E. rajtas ricevi la kolekton kontraŭ nura pago de la sendkostoj; ĝi povas resti maksimume unu semajnon je la servo de la petinto. De la valoraj esperantaĵoj estas aldonita listo; la uzantoj respondecas okaze de perdo, senvalorigo, k. t. p.

10. — PROPAGANDO PER GAZETOJ. Por plifaciligi la propagandon en la lokaj gazetoj, je intenco de la propagandistoj aperas ĉiumonate en F. E. plena paĝo da komunikoj pri la progreso kaj la aplikado de Esperanto. El la demandaro kiun sendis la ligestraro al la sekcioj kaj reprezentantoj, rezultas ke preskaŭ neniu el ili konscias pri la utileco de konstanta publikigo de malgrandaj komunikoj en lokaj kaj regionaj gazetoj. Esplorado de la ciferoj montras ke plej-ofte neglektado de la gazetpropagando sin respegulas en la sukceso de la kursoj. Konkludu vi mem el la sekvantaj statistikaj nombroj de du sekcioj. Gazetartikoloj : 4 — kursanoj : 7; Gazetartikoloj : 5 — kursanoj 10. Post tia preparo (?) oni ne plu asertu ke en tiuj urboj la loĝantaro ne havas intereson por Esperanto ! Ekde kelkaj monatoj aperas ĉiusemajne ampleksa ilustrita rubriko en la grava ĵurnalo « De Dag », prizorgita de nia ligano S-ano Fr. Mortelmans. La deziro de la estraro estas starigi gazetservon sed malgraŭ niaj klopodoj, ni ne trovis ĝis nun laborpretan samideanon.

11. — RADIO. Se ne eble estis atingi ion ĉe la nacia radio-stacio, ni havas pli da sukceso ĉe la regiona stacio de Okcidenta Flandrujo, en Kortrijk, kie ni disponas pri kvarona horo por disaŭdigi E-kronikon. 49 elsendoj okazis dum 1936. Se ni deziras enpenetri en la radio-mediojn, necesas senlace agi; plej fruktedona povus tion fari esperantisto radio-klubo, laŭ la modelo de tiuj kiuj ekzistas en kelkaj landoj. Jen nova tasko, por nova sub-fako, por kiu ni atendas novan laborpretan samideanon !

12. — EKZAMENA KOMISIONO. Jam pasintjare, dum la kongreso en Gent, estis decidite pristudi la organizon de ekzamena komisiono. Kvankam la afero ne efektiviĝis, la prepara laboro ne ĉesis; ni esperas ke ĝi realiĝos samtempe kun la fondota sekcio de geinstruistoj. Intertempe F. E. I. havigas atestojn pri sekvado de E-kursoj.

13. — KONKLUDO. Se antaŭe, por plenigi la kongresraporton, ni havis nur statistikon pri ricevitaj kaj forsenditaj korespondaĵoj, nun, por la unua fojo, ni povas prezenti al vi raporton kiu respegulas gravan progreson kaj kiu permesas la plej optimistan esperon por la estonteco. Se longtempe la Ligo stagnaciis ĝi nun, sub la gvido de plej grandparte renovigita estraro, sanigis la bazon kaj preparis la terenon por vigla atako kaj ĝi deziras stari venontjare antaŭ vi kun 1.000 membroj. Kiel vi ĵus aŭdis, pluraj subfakoj estas organizotaj; ni substrekas la farintan alvokon kaj ripetas : ni atendas novajn laborpretajn samideanojn.

Ni faris nian devon ĝis la ekstrema limo kaj nun prezentas la manon al la gemembroj pretaj sin dediĉi al la plua venko de Esperanto en Flandrujo !

La ĝenerala kasisto, S-ano A. De Keyzer, komunikis la financajn raportojn : 1936-37.

Financa raporto pri Flandra Ligo Esperantista

| ENSPEZOJ : | | ELSPEZOJ : | |
|---|---|---|---|
| Saldo 1935-36 | 729,70 | Preso | 5.485,20 |
| Abonoj | 6.030,— | Ekspedo | 390,25 |
| Subteno | 581,55 | Skribmaŝino | 430,50 |
| Anoncoj | 450,— | Administracio | 271,25 |
| Kongreso Gent (206 × 2 fr.) | 412,— | Redakcio | 97,90 |
| | | Kontoraj bezonajoj | 21,40 |
| Maln. kolektoj, opaj n-oj | 86,— | Varbkonkurso | 246,75 |
| Diversaĵoj | 38,40 | Prem. « Ang. Serĉemuloj » | 60,— |
| | | Diversajoj | 100,— |
| | | Saldo | 1.224,40 |
| | 8.327,65 | | 8.327,65 |

Financa raporto pri Flandra Ligo Esperantista

| ENSPEZOJ : | | ELSPEZOJ : | |
|---|---|---|---|
| Kotizoj | 1.866,30 | Korespondelspezoj estraro | 474,66 |
| Kongreso Gent 1/2 de la saldo) | 218,30 | Presajoj | 264,20 |
| | | Kontoraj bezonajoj | 43,25 |
| Diversaĵoj | 17,50 | Migranta Ekspozicio | 100,— |
| | | Vojaĝkostoj sekciaj del. | 55,70 |
| | | Diversajoj | 115,10 |
| | | Saldo | 1.049,19 |
| | 2.102,10 | | 2.102,10 |

Por la kontrolo de la kaslibroj sin prezentis S-anoj De Boes kaj De Troeyer.

S-ano E. Cortvriendt, vicprezidanto, proponas sendi saluttelegramon al radio-stacio Kortrijk (aplaŭde akceptita). Poste li faris kel-

kajn komunikojn pri la novorganizo de la Ligo. Pasintjare, dum la estrarkunveno de la kongreso en Gent, ni decidis alporti gravajn ŝanĝojn al la organiza strukturo de nia organizaĵo; la estraro planis kaj jam parte aplikis la novan labormetodon, la ĝenerala jarraporto atestas pri la efiko. Necesas ankaŭ forigi la malnovan spiriton de la grupoj kiuj longtempe sin konsideris kiel sendependaj kaj neniel ligitaj al la ligo, tiu tempo forpasis; nun la Ligo konsistas el *sekcioj* kiuj devas konscii, ke krom rajtojn, ili ankaŭ havas devojn. Ankaŭ ŝanĝos la metodo por la enkasigo de la kotizoj : estonte la sekcioj devas kolekti la abonpagojn kaj kotizojn kaj grupe sendi al la centro. Tiu tasko devas esti plenumata antaŭ la 1-a de Julio venonta.

La vicprezidanto ankaŭ fiksis la atenton al la lasta decido rilate la reorganizo. Tiun decidon la antaŭa ligkunveno unuanime aprobas, tamen la teksto aperis malkomplete en F. E. La decido tekstas jene : « Al ĉiuj funkciuloj (ligestraranoj, sekci-estraranoj, reprezentantoj, k. t. p.) de F. L. E. estas malpermesata okupi similan, aŭ iun ajn gvidan postenon en alia nacia E-organizaĵo laborante, ĉu tute, ĉu parte en Flandrujo ». Ni postulas ke niaj funkciuloj sin tute dediĉu al F. L. E.; malebligante dusencan agadon, ni estas certaj, ke malrekte ni faras servon al la aliaj naciaj E-organizaĵoj.

La vicprezidanto finis, komunikante decidon de la sabata estrarkunveno pri la sinteno de F. L. E. rilate al la grandaj flandraj manifestacioj de ĝenerala intereso, ekzemple la Izerpilgrimado kaj la nuna manifestacio por amnestio en Brussel. La Ligo alvokos siajn anojn al partopreno, la lokaj sekcioj surloke prizorgos la partoprenon.

La prezidanto aldonis kelkajn ĝeneralajn konsiderojn; jus sin anoncis nova sekcio en Lebbeke kaj tri novaj reprezentantoj : Hamme, Mol, St. Truiden. Li gratulas la novajn sekciojn kiuj laboras en intima kunlaboro kun la ligo kaj admonas la malnovajn sekciojn pro ilia tro sendependa agado. Nur kunlaboro ebligos atingi sukcesojn, la estraro promesas duobligi siajn klopodojn, niaj sekcioj estu helppretaj kaj sin reprezentigu en niaj ligkunvenoj.

Ĉar niajn sekciojn ni nombras precipe en okcident- kaj orient-Flandrujo, estas decidita okazigi la ligkunvenojn denove en Gent. La venonta Ligkunveno okazos la 26-an de Septembro en « Elckerlyck ».

S-ano Verheyden, nome de sekcio Antwerpen, atentigis ke en 1939 ni festos la 10-jaran datrevenon de la fondo de F. L. E.; sekcio Antwerpen opinias ke tio estos taŭga solenaĵo por inaŭguri nian ligan flagon kaj proponas malfermi donacliston por kolekti la bezonatan monon (aplaŭde akceptita).

La venonta kongreso de F. L. E. okazos verŝajne en Brugge.

La festeno okazis en restoracio « Monico », dum ĝi oni aŭdis la salutparoladojn de la eksterlandaj gastoj. Interesa vizito al la universitata biblioteko kaj al la pitoreska beginejo plenigis la ceteron de la posttagmezo.

En « Studentenhuis » okazis la jarkunveno de F. U. K. E. kaj en « Vlaamsch Huis » la fondkunveno de la instruista subfako de F.L.E. La provizora estraro konsistas el S-anoj E. Symoens, J. Jacobs kaj F. Couwenberg.

Festvespero en « Monico » denove kunigis la samideanojn en plej agrabla atmosfero.

La lunda kaj lasta kongrestago estis rezervita al ekskurso al Tervuren kaj al vizito de la interesa kolonia muzeo, por fini okazis vizito al la kermeso. En Leuven la adiaŭa vespero kunigis 30-on da kongresantoj.

La 218 gekongresanoj, inter kiuj multaj por la unua fojo partoprenis nian jaran ĉefkunvenon, certe kunportis plej agrablan impreson pri ĝi; same kontenta estas la ligestraro, ĉar la kongreso staris en la signo de fruktedona laboro.

La Sekretario.

# Esperanto in dienst der Wetenschap

De behoefte aan een internationale taal op handelsgebied en voor toeristische doeleinden wordt doorgaans met open oog erkent. Echter worden de diensten, welke Esperanto aan de wetenschap reeds biedt, alsook de taak die deze taal bij een ruimere toepassing in de wetenschappelijke wereld is weggelegd, vaak onderschat of men is er — bij ons tenminste — onwetend van.

Kunst en voornamelijk wetenschap zijn bij uitstek internationaal. Als logisch gevolg hiervan vinden we een zekere internationaliteit in de letters van het alphabet, het notenschrift, het blindenschrift, de arabische cijfers, de algebraïsche en chemische formules, alsook in de telegrafische codes, de handelscodes, de signalisatie voor auto- en spoorwegverkeer en in de signalisatie voor scheepvaart en leger.

De standardisatie der technische taal en de internationaliseering der technische symbolen staan aan de orde van den dag. Slechts het gebruik eener internationale taal zal een degelijk normalisatie mogelijk maken. Dat Esperanto geroepen is die rol te vervullen, toonen de technische werken en woordenboeken die de laatste jaren in deze taal verschenen. Vestigen we hier terloops de aandacht op het zestalig « Woordenboek der Electrotechniek », dit standaardwerk, vrucht van 30 jaar arbeid, ging eindelijk ter perse en zal insgelijks in Esperanto de verklaring geven der technische termen.

Op het gebied der wetenschappelijke documentatie kan een internationale taal insgelijks uitstekende diensten bewijzen. Nu verschijnen in alle landen speciale tijdschriften met overzichten van de wetenschappelijke wereldpers. Wegens de noodzakelijke vertaling en het beperkt lezerstal gaat zulks met groote financieele moeilijkheden gepaard, landen met beperkt taalgebied kunnen zich die weelde doorgaans niet veroorloven. Slechts Esperanto kan hier een rationeele oplossing brengen.

Dat het Esperanto op wetenschappelijk gebied reeds zijn toepassing vindt, bewijst het bestaan van een flink aantal wetenschappelijke vakorganisaties, die alle een eigen tijdschrift in het licht geven geheel in het Esperanto opgesteld. Zelfs maandbladen voor vulgarisatie van Wetenschap verschijnen in de internationale taal.

In Japan, waar de behoefte aan een internationale taal het diepst wordt aangevoeld, werd het eerst naar Esperanto gegrepen. Een honderdtal werken werden door Japanners op wetenschappelijk gebied reeds uitgegeven. Vermelden we hier slechts het wekelijksch bulletijn en de jaarboeken welke het aerologisch observatorium van Tateno sinds 1928 regelmatig uitgeeft.

het heeft geen betoog welk voordeel het publiceeren van wetenschappelijke werken in Esperanto biedt. Al is deze taal op verre na nog niet zoo verspreid als de groote nationale talen, toch zijn haar beoefenaars meer internationaal verspreid en daar komt het voornamelijk op aan : niet één taalgebied, maar de wetenschappelijke kringen in zooveel landen mogelijk bereiken.

Het steeds intenser gebruik der internationale taal in Japan had voor gevolg dat in Januari j.l. de Japansche wetenschappelijke Esperanto Associatie werd gesticht. In het eerste nummer van haar tijdschrift « Scienco » lezen we dat deze nieuwe vereeniging er voornamelijk naar streeft het gebruik van Esperanto onder de wetenschapsmenschen algemeen door te voeren en de geleerden, in het publiceeren hunner werken in de international taal, behulpzaam wil zijn. In dit nummer vinden we verder een eerste ledenlijst met 450 namen waarin Dr Zinkiti, gewezen rector der Keizerlijke universiteit Tôhoku, als algemeen directeur staat vermeld.

We wenschen niet verder uit te wijden over het voordeel dat het gebruik van Esperanto op internationale wetenschappelijke congressen biedt, vergenoegen we ons vast te stellen, dat Esperanto als rationeele oplossing der internationale taalmoeilijkheden steeds meer ingang vindt, de wetenschap en de menschheid ten bate.

E. C.

## En la klaso

Antaŭ mi en klaso
Flavaj benkoj estas,
Inter aŭskultantoj
Eĉ knabin' ĉeestas

Knabin' bela, eĉ pli bela
Ol la rozoj estas,
Helpe kiu en novformoj
Regulon mi vestas

Kutime ŝi kuraĝiĝas
Respondi je la demand'
Kaj min varmo ĉirkaŭigis
De ŝia ĉarma rigard'.

K. Solc.

## Flandraj Studentoj

Plenplenaj estas pokaloj
Kaj gaje sonas studentkant'
En ĝi la ĝojo de la viv'
Kaj amo al la patroland'.

Kantu nur gaje studentoj,
En vi viviĝas de pratemp' gentoj
En vi la esper' de la land',
Marŝu nur pluen kun la kant'

Flava kaj nigra via flag',
La sama via studentĉap',
Ambaŭ fiere portu vi
Kaj vivu en bona harmoni'.

K. Solc.

# Diversajoj

ESPERANTO EN BRUSELO. — Mi jam informis en tiu-ĉi revuo pri la fondiĝo en Bruselo de interkluba komisio, nomita E. R. B. (Esperantista Reprezentantaro Brusela) al kiu ankaŭ la flandra sekcio N.E.L.E. aliĝis.

Dank' al la agado kaj oferemo de la iniciatinto, S-ro Buenting, la Brusela publiko pasintan vintron konatiĝis kun Esperanto pere

de multnombraj afiŝoj, flugfolioj, gazetanoncoj, k.t.p. En la palaco de la belaj artoj okazis sukcesplena festvespero kun paroladoj, artaj kantoj en Esperanto, demonstracia leciono laŭ Ĉseh-metodo, kaj ekspozicio de esperantaj presajoj kaj libroj. En Decembro samspeca festo okazis en laborista salonego.

En Januaro S-ro Buenting komencis Ĉseh-kurson. Post sekuaca propagando 30 lernantoj enskribis el kiuj 28 perfinos la lecionojn je la fino de ĉi-monato. La diversaj aliĝintaj kluboj klopodos varbi la novulojn por ke la laboro de S-ro Buenting ne perdiĝu.

G. B.

* * *

LA FEDERACIO DE LABORISTAJ ESPERANTISTOJ en la regiono de la nederlanda lingvo, tenis sian 22-an kongreson en Gent dum Pasko pasinta. Ĝin partoprenis 750 personoj, sekve tiu kongreso estas la plej impona nacia E-kongreo kiu ĝis nun okazis en Flandrujo. La Federacio nombras pli ol 5.000 membrojn kaj estas la plej forta nacia E-organizo nun ekzistanta.

* * *

En la jubilea jaro de Esperanto komencas aperi nova biblioteko ĉe la eldonejo J. Muusses en Purmerend (Nederlando). La biblioteko aperos en serioj de po dek volumetoj. La eldonejo projektas ĉiujare aperigi minimume unu serion.

Jam aperis tri volumetoj:

1. J. Glück, La Grandaj Filozofoj kaj la universala lingvo.
2. Rusaj Noveloj. Tradukis A. Filatov.
3. Teo Jung. De Muheddin ĝis Mundilatin. Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj.

Unuopa numero kostas 5,80 fr. Tuta serio de dek volumetoj kostas en abono nur 41 fr. La modera prezo ebligas al ĉiu, aĉeti la bibliotekon.

Detala prospekto estas havebla ĉe Flandra E-Instituto, kie ankaŭ la libretoj estas aĉeteblaj.

* * *

INTERNACIA SEMAJNO EN BRUGGE okazos de 17-25 Julio venonte. Simila semajno okazos en Amsterdam 22-28 Aŭgusto. Programojn kaj informojn havigas : Vojaĝoficejo L. E. E. N., Rokin 57 Amsterdam (Nederlando).

* * *

DANA ESPERANTO-INSTITUTO denove invitas samideanojn el la tuta mondo por partopreni la Internaciajn Feriajn Esperanto-Kursojn kiuj okazos en la Internacia Altlernejo en Helsingör, Danlando. En la pasinta jaro partoprenis 110 personoj el 10 landoj. Jen bonega okazo ne nur por progresigi en Esperanto sed ankaŭ por persone ekkoni kion la internacia lingvo nuntempe valoras. Internacia lingvo nuntempe valoras. Interesiĝantoj bonvolu peti senpagan prospekton kaj informojn de samideano Karlo Solc, instruisto F. L. E., Zandstraat 16, Kortrijk.

* * *

La Itala Ministerio por Propagando, Turisma Fako, eldonis tre interesan broŝuron pri la hotelkuponoj kaj benzin-kuponoj por la fremduloj en Italujo; instrukcio pri aĉetado kaj uzado de tiuj kuponoj. Turistoj irontaj al Italujo nepre bezonas tiun broŝuron, kiu enhavas valorajn informojn pri la favoraĵoj konsentitaj ĉe la fervojoj kaj listo de la hoteloj kiuj akceptas la kuponojn.

Ĝi estas havebla ĉe « Enit », Via Vittorio Veneto, 62, Roma.

TUTMONDA ADRESARO DE LA ESPERANTISTOJ nun estas en preparo, ĝin kompilas Internacia Esperanto-Muzeo, Neue Burg I, Wien, kiu garantias por la unua eldono minimuman nombron de 5.000 adresoj. Mencio de adreso kostas 1sv. fr. la 7.000 unuaj anoncintoj ricevos la adresaron, kiu aperos la 15-an de Decembro, senpage. Pliajn detalojn petu de I. E. M.

* * *

ESPERANTO ASOCIO DE NORDA AMERIKO klopodas atingi la eldonon de jubilea Esperanto-poŝtmarko. Tiucele ĝi petas la ĉiulandan samideanaron helpi per la sendado de leteroj kaj poŝtkartoj al : Postmaster General, Washington USONO (U.S.A.), por ke la Usona poŝtadministracio eksciu pri la interesiĝo de la tutmonda Esperantistaro.

* * *

ESPERANTO EKZAMENOJ. — La 25-an de Aprilo okazis en Aarschot Esperanto-ekzamenoj pri simpla kaj supera kapableco.

Akiris ateston :

*Pri simpla kapableco :*

*kun plej granda distingo :* S-ro De Kesel el St. Amandsberg.

*kun granda distingo :* F-inoj Grandjean J., Wyns M. el Aarschot kaj F-ino Goossens B. el Rillaar.

*kun distingo:* F-inoj Moons M., Moons R., S-roj Patteet J. kaj Luyten L. Ĉiuj el Aarschot, kaj S-ro de Ryck C. el Rillaar.

*Pri supera kapableco :*

*kun kontentigo :* F-ino Taymans M., S-roj Patteet Fr. kaj Mertens Fr. Ĉiuj el Aarschot.

Ni kore gratulas ĉiujn !

* * *

POR NIA LIGA FLAGO : Kolekto dum la ĝenerala jarkunveno en Leuven, 260,—; Sekcio Antwerpen (Flandrema Grupo Esperantista), 100,—; Rainson H., 20,—; Debrouwere G., 20,—; Cortvriendt E., 20.—; De Keyzer A., 20.—; Van Winckel (Aarschot), 20.—; Terrijn J., 20.—; Van As J., 20.—; Cognie A., 20.—; Lenaers G., 20.—; De Boes G., 25.— ;Suda Kruco (Eindhoven), 25.—; Grupo el Amsterdamo, 15.—; Broodcoorens G., 5.—; Ackaert A., 5.—; Calloens L., 10.—; Van Deun-Jespers, 5.—; De Cock P., 10.—; Geukens (Millen), 10.—; Pittoors, 5.—; ENTUTE : 655 fr.

*Fotoj* de la 8-a kongreso ĉiam haveblaj po 2,50 fr. Ankaŭ pli grandformataj, se certa nombro da personoj enskribiĝas. Prezo 5 fr. Mendojn akceptas S-o Cnops, Broekstraat, 21, Heverlee.

KURSGVIDANTOJ atentu ! Ni helpos al vi dum la kurso kaj sendos donacon por viaj lernantoj. Skribu al K. Kalocsay, Hungarujo, Budapest VIII. Mària-u 34.

***

INTER LA FLANDROJ. - Niaj legantoj jam informiĝis pri la grandaj progresoj de nia movado en Flandrujo. La fondiĝo de ĉiam novaj sekcioj atestas pri tio. Tiun progreson ni ŝuldas grandparte al la laboro de la Ĉseh-instruistoj

En la Aprila numero de nia Revuo ni jam konatiĝis kun S-ro Stuit, kiu de pluraj monatoj instruas en nia lando. Kun intereso ni legis lian artikolon, pri liaj tramigroj, liaj spertoj en multaj landoj, ankaŭ pri la genia instrumetodo de S-ro Ĉseh.

Sed por pli bone konigi tiun metodon, S-ro Stuit verkis legolibron, precipe destinata por siaj gelernantoj, en kiu li donas klaran bildon pri, kaj kie ni povas sekvi ĉiujn detalojn de tiu miriga instrumetodo. En sia verketo li montras al ni la diversajn epizodojn en la Ĉseh-kurso, la aranĝojn kaj la surprizajn rezultatojn de la finfesto kun teatrajoj kaj kantoj. Plie, li rakontas al ni pri personaj impresoj kaj travivaĵoj. Ne mankas la necesa spico, kiu ja estas konata kaj ŝatata en la Ĉseh-kurso, nek seriozo pripensiga. Entute, facila, samtempe agrabla legaĵo, verkita en flua, glata stilo. Kvankam la libreto estas ĉefe destinata por la kursfinantoj, por novaj esperantistoj, tamen la malnovuloj kiuj volas ekscii iom pli pri la Ĉseh-metodo certe havigos al si la libron. Jam nun mendu la libron « Inter la Flandroj » ĉe la Esperanta Grupo Zamenhof » IJzerlaan, Diksmuide. Prezo fr. 7,50.

# Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

GEBONDEN STIJL. *Een en ander over poëzie in Esperanto door F. Faulhaber. Uitgave van de Federatie van Arbeiders-Esperantisten in het gebied van de Nederlandsche taal. Prijs 0.35 gulden. Postbus 0.50 Amsterdam Oost-Postgiro 111278.* — Er wordt veel gedaan aan dichten rijmen of hoe men het ook noemen wil. Esperanto schijnt er veel toe bij te dragen. Nochtans een dichter wordt geboren, dit leert men niet. Wie dan toch wil dichten blijve ten minste in de regels der kunst. Kort en bondig wordt deze U uiteengezet in dit boekje van ongeveer 40 bladzijden. Talrijke voorbeelden wijzen er U op hoe en met welke woorden men verzen moet of kan maken. Te veel slechte verzen en zelfs gedichten worden er gemaakt in Esperanto. Dit diegene welke denken te kunnen dichten of zelfs slechts uit liefhebberij dichten dit beknopt boekje aandachtig lezen en bestudeeren. Het zal werkelijk bijdragen tot zuiver werk.

H. V. D.

Vraag aan Libro Servo F. L. E. Amsterdam O. Postbus 050 «Fondskatalogus». Deze bevat de naam en prijs der beste uitgaven voor beginnelingen en progresantoj.

# Grupa Vivo

*ANTVERPENO. FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.*

Kiel akiri monon por la grupkaso ? Aranĝu kabaredvesperon !!! Almenaŭ nia kabaredvespero de la 24-a de Aprilo brile sukcesis. Muziko. deklamado, lotumado kaj fine balo. Kompreneble multaj iris hejmen je sufiĉe frua horo... la postan matenon. La 2-an de Majo 8 membroj de nia grupo ĉeestis la regionan kunvenon en Meĥleno. Imitinda ekzemplo ! La letervespero de la 5-a de Majo alportis al ni pli ol 30 kartojn kaj leterojn, el plej diversaj partoj de la mondo. Ĉiu membro ricevis sian parton por respondi. La kongreson en Loveno ni ĉeestis deksepope. Kvankam kontentige, ni tamen devas zorgi, ke estonte ĉiu membro(ino) de la grupo ĉeestos. Pri la propono de nia Prezidanto dum la kongreso, la kongresraporto sufiĉe bone konigos al vi la rezultaton. Restas nur al ĉiu grupo, al ĉiu membro ke ili daŭre laboru, por ke tiu propono realiĝu !!!

Regiona kunveno okazos en nia ejo « Nieuwe Carnot », Carnotstr., 70, la 13-an de Junio. Je la 10-a horo.

Ĉu ni povas renkonti vin tie ?? Bonvenon !

*BRUSSEL. N. E. L. E.*

La 13-an de Majo E. R. B. (Esperantista Reprezentantaro Brusela) organizis kursfinan feston en la salonoj de « Brasserie Flamande ». Niaj anoj kaj la lernantoj de niaj du kursoj ĉeestis tiun sukcesitan feston kiun ankaŭ ĉeestis kelkaj membroj de sekcio Vilvoorde.

N. E. L. E. liveris al nia kongreso 8 gepartoprenantojn.

*OUDENAARDE. AL PACO.*

Dum la monato de Junio ni interkonatiĝos kun niaj novaj esperantistaj beboj en nia grupo. Je tiu okazo ni havos specialan programon.

La 2-an ni kune pritraktos starigon de novaj aranĝoj en la grupo.

La 9-an ni havos nian kantvesperon kaj certe ni pli bone sukcesos ĉar pli multnombre, la gepartoprenantaro kunhelpos por pliagrabligi niajn ekskursojn.

La 16-an ni havos perfektigan kurson por ke la genovuloj bone lernu la uzadon de nia esperanto lingvo.

La 23-an ni amuzos nin per diversaj ludoj.

Gesamideanoj, partoprenu niajn kunvenojn, por ke vi komprenu la gravecon de tiuj aranĝoj. Nur tiamaniere ni faros taŭgan laboron por antaŭenigi nia interna kaj propaganda laboro.

# Angulo de la Serĉemuloj

Por ĉiu problemo ni forlotumos unu premion. La vortoj kun (R) estas radikvortoj. La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5-a de Julio 1937 rekte al S-ro F. VOLDERS, Bredastraat, 94, Antwerpen.

Premioj. Por problemo 22 gajnis premion S-ro A. De Groote.

Por problemo 23 neniu gajnis premion, ĉar... neniu bone solvis ĝin !

*Solvo de problemo 22 :*


*HOR.* : Kaĉej — Julio — asekuri — nest — naĝ. — ski — ili — nem — ok — dukat — M. P. — nom, nun, — mel — aniz — falu — nominal — trink — imago.

*VERT.* : Konsonant — ekkon — ĉasi — mini — est — zon — je — iun — mk — kalkuli — ju — ian — ni — urn — fam — lian — mala — ĝemel — Olimpludo.

*Solvo de problemo 23 :*

La knabo prenis kaj formanĝis UNU pomon ! Li do ne tuŝis la pomojn, kaj la pomo *I* n ankaŭ ne restis ĉar restis nur pomo.

## PROBLEMO 26 KRUCVORTO.



*HOR.* : 1) Rabobirdo. — Ĉefa arterio. (R).
2) Malvera opinio, Malkorektaĵo. — Floro. (R).
3) Egipta sundio (R). — Teatra verko. — Dependiga konjunkcio.
4) Arbo. (R). — Moviĝi seninterrompe malsupren. (R). — Atmosfero. (mall.).
5) Densa fluaĵo. (R). — Prefikso montranta antaŭtempecon.
6) Kokinprodukto. — Serpento. (R). — Familiano.
7) Fremdlanda samideano. — Rapidaĝa. — Oficiro.
8) Elpeli, forpuŝi. (R). — Linio de la vizaĝo. (R).
9) Fermi. (R). — Superanta la ĝustan mezuron.

*Vert.* : 1) Spirebla gaso (adj.). — Fordonaci ion al Dio. (R).
2) Famkonata Esperantisto.
3) Artikolo. — Aparato. — Zamenhofa glumarko.
4) Regula aranĝo. (R). — Tufo da haroj. (R).
5) Persono kiu mortigis siajn gepatrojn. (R). Negocebla valorpapero. (R).
6) Altiri per flataj rimedoj (R).
7) Sategu. — Granda. (R).
8) Ludkarto. — Praktika apliko de la sciojn akiritaj per studo. (R).
9) Verba finaĵo. (R). — Papago. (R). — Suprajomezuro. (R).
10) Nomo de eksgrupo en Antverpeno, plej malgranda distanco inter du punktoj.
11) Skueti, vibregi (R). — Okazanta multe da fojoj.

## PROBLEMO 27 (5 poentoj)
## FAMILIO-PROBLEMO

La ruza kvinjara knabeto de la familio Jansens ludis trankvile en la salono. Envenis liaj gepatroj, lia plej maljuna fratino kun sia edzo, kaj lia plej juna frato kun sia amiko. La knabo tre ĝojis ĉar tiom da personoj vizitis lin, kaj post kalkulado, li diris : nun ni estas sesope ! Kiamaniere vi klarigas tion ?

# FLANDRA LIGO ESPERANTISTA
## (Vlaamsche Esperantisten - Bond)

**Voorzitter:** H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
**Ondervoorzitter:** E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
**Sekretaris:** Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
**Penningmeester:** Adolf De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
**Propaganda:** Gerard Lenaers, Willemstraat, 22, Hamme (O. Vl.).
**Orgaan:** « Flandra Esperantisto », maandblad.
**Lidmaatschap:** 5 fr.; met maandblad: 25 fr.
**Postchek:** Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50

### AFDEELINGEN:

**Aalst:** « Pioniro ». Sekretariaat: Molenstraat,30.
**Aarschot:** « La Progreso ». Sekretariaat: Albertlaan.
**Antwerpen:** « Flandrema Grupo Esp-ista ». Sekr.: Statiestraat, 156, Berchem.
**Arendonk:** « La Verda Kampina Stelo ». Sekretariaat: Schotelven, 4.
**Blankenberge:** « Norda Stelo ». Sekretariaat: Koninginnelaan, 18.
**Brussel:** « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. Van Humbeekstr., 3.
**Diksmuide:** « Grupo Zamenhof ». Sekretariaat: Maria Doolaeghestraat, 36.
**Kortrijk:** « Esperantista Grupo ». Sekretariaat: Moeskroenstraat, 11.
**Lebbeke :** « Esperantista Grupo ». Sekretariaat, Stationstraat, 87.
**Leuven:** « La Nova Tagiĝo ». Sekretariaat: Broekstraat, 21, Heverlee.
**Lichtervelde:** « La Tagiĝo ». Sekretariaat: Wetstraat, 44.
**Mechelen:** « La Estonto ». Sekretariaat: Vekestraat, 25.
**Oostende:** « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: Peter Benoitstr., 27.
**Oudenaarde:** « Al Paco ». Sekretariaat: Nederstraat, 8.
**Roeselare:** « Ruselara Esperantista Grupo ». Hoogledesteenweg, 163-165.
**Tienen:** « Zamenhofa Standardo ». Sekretariaat: Bruulstraat, Kumptich.
**Torhout:** « La Verda Stelo ». Sekretariaat: Boomgaardstraat, 4.
**Vichte :** « La Frateco ». Sekretariaat: Harelbekestraat, 29-a.
**Vilvoorde:** « La Verda Stelo ». Sekretariaat: Marius Duchéstraat, 45.
**Woumen:** « Veni, Vidi, Venki » (V.V.V.). Sekretariaat: (Rom. Vandepoele).
**Zaventem:** « Verda Standardo ». Sekretariaat: Heldenplaats, 115.

### VERTEGENWOORDIGERS:

**Assche** (Brab.): L. De Rop, Tenberg, 24.
**Astene:** M. Vanderlinden, Dorp, 54.
**Deerlijk:** Fr. Benoit, Kapellestraat, 7.
**Gent:** F-ino J. Terryn, Raapstraat, 82.
**Hamme** (Vl.) : G. Lenaers, Willemstraat, 22.
**Harelbeke:** A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.
**Mol :** L. Claeys, Kapellestraat, 3.
**Mortsel:** H. Van Durme, Eggestraat, 21.
**Ronse:** G. De Boes, Wijnstraat, 81.
**Sint-Truiden :** G. Mathijs, Steenweg op Hasselt, 55.
**Tielt:** R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.

# Senprokraste Renovigu viajn Kotizojn!

**Membroj=Abonantoj : 25 Fr; Simplaj membroj : 5 Fr.**

**Sekcianoj pagu en viaj sekcioj! Izoluloj pagu rekte al F.L.E. (P.K. 232150)**

# Varbu anoncojn!

OSTENDO

# HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

## MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

DRUKKERIJ

★ Aŭtomata Presejo

## H. BRAEKEVELT

**Statiedreef, 177, Roeselare.**

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.
Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.
Liveras al la diversoj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.

**Tel.: 1080.**

## "BREUGHEL"

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacqmainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)




## Café "Nieuwe Carnot"


**FRANS NEEFS-D'HELDT**

**Carnotstraat, 70 — Antwerpen**

Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj manĝaĵoj — Bonega servado.

**Ejo de Flandrema Grupo.**



**Proksime de la naĝejo (200 m.).**

**St MARIABURG**

10 KM. DE ANTVERPENO

## Grand Hotel de la Chapelle

**lokita en arbarĉirkaŭaĵo**
**ĉia moderna komforto — aŭtomobilejo**
**laŭnteniso — infanludejo — teraso**
**Restoracio — Familia pensiono**

N.B. - Elektita loko por ekskursaj celoj
Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

Wwe VAN HAVER-DE BOES

« Presejo Groote Centrale Drukkerijen », Lange Lozanastraat, 181, Antwerpen.